

## KOMUNIKOJ DE LA DIREKCIO

*Sub tiu titolo ni respondos la demandojn, kiuj ne necesigas leteron. Kiu desiros privatan respondon, tiu bonvolu skribi per poŝtkarto kun parto por respondo pagata.*

➤ S-o A. Barbot estas nur presisto kaj ne libristo. Tial oni sin turnu al li nur por l'abonoj. Ĉiuj ceteraj leteroj aŭ mendoj devas esti adresataj *rekte* al la Direktoro de E. K.

➤ Ni petas la **Direktoroj de Esperantaj gazetoj, ke ili ŝanĝu la malnovajn adresojn de E. K. kaj de ĝia Direktoro.**

## UNIVERSALA INFORMADO (U. I.)

*Anoncoj, komunikoj de U. I. estu sendataj, kun antaŭa pago, rekte al la Direktoro de la revuo.*

Abonintoj de E. K. povas komuniki al ceteraj legantoj ĉion, kion ili volas, pagante por unu vorto kvin centimojn. Vorto da pli ol dek literoj kostos duoble; — vorto da pli ol dekkvin literoj kostos trioble; vorto da pli ol dudek literoj ne estos akceptata.

**Loĝado en Francando :** ➤ JUNULO estus akceptata kiel lernanto aŭ loĝanto en la domo de la Direktoro de E. K. Modera pago.

**Gazetoj :** ➤ LE SOUVENIR, Monato Ĵurnalo literatura. — BELGUJO: 1 frank. — Unuiĝo poŝta: 1 fr. 50 — Direktoro-Fondatoro: XAVIER CASIER, Premiita de Akademio Reĝa de Bel-Artoj, membro de komitato de « Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

➤ LE GLANEUR, Literatura, scienca, muzika kaj bibliografia. — Revuo monata. — Abonkosto: Belgujo: 2 fr. — Ekster Belg. 3 fr. — Administracio, redakcio kaj anoncoj: 406, rue Vanderkindere, Uccles (Bruxelles).

➤ GUIDA CARTOFILA ITALIANA, belega rev., interesege por kolektist. de poŝtk., de « ex-libris » kaj markoj datmemorigaj. Direkt. Grafo D. Cumbo, via S. Maria la Porta, 9. Messina. Abon. kun rajto por unu enpresado de koresp. 3 fr. en Itall. 4 fr. ekstere.

**Korespondado :** ➤ S-INO JANE PARIS, Les Hommeaux, Lion d'Angers, (M.-et-I.), dezir. korespondadi per ilustrit. poŝtkartoj aŭ leter. kun ĉiuland. Esperantist.

**Kolektistoj :** ➤ S-o VARJU Endre, Budapest IV, Kygio U. 6. 2. em. 14 kolektas k. interŝanĝas uzitajn poŝtm.

➤ ESPERANTA-KARTOFILATELA KLUBO (E.K.K.), sola klubo kartof.esperant. Jara kotizaĵo: 2 fr. 50. Iu aliĝanto ricevos la revuon Le Carto-Philatélique Journal, oficiala organo de l'klubo. Direkcio 91, rue de Dunkerque, Paris.

➤ **Fotografajoj.** — S-o Jakobo Meazzini (vidu adreson en la nomaro de la Rajtigitoj) skribas al ni « En la venonta somero mi deziras presigi artikolon en la itala monata gazeto *Varietas*, kun la

ĉefaj ilustraĵoj de eminentuloj esperantistaj. Tial mi petas samidea nojn, ke ili bonvolu sendi, por tiu dato, kelkajn belajn fotografaĵojn. »

➤ **S-ro Filippo Mancini**, Montecchio, Castiglione-Fiorentino (Arezzo) Itallando, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkart. vidaĵaj.

➤ **Rudolf Richter**, Buchdruckerei, REICHENBERG, Bergelgasse, 8 (Bohmen-Bohemujo). fabrikas beletajn reliefaĵojn tre artajn; deziras Riprezentantojn katolikajn.

➤ **Manufakturo de trinkaĵoj** kotonaj, fadenaj, lanaj. DORÉ KAJ K-o. 4, rue Jeanne-d'Arc, TROYES (Francl.). Petu beletan. prezaron Esperantan. — Ŝtrumpoj por virinoj, de 20 fr. po dekduo. Ŝtrumpetoj por viroj, de 15 fr. po dekduo.

➤ **Tradukataj verkoj presotaj.** — « KRISTNASKA SONORADO » (Christmas Carol) de Charles Dickens, estas tradukata de nia amiko D-ro Martyn Westcott. — *Imitado de Jesuo Kristo*, esperantigita de A. Damevido, presiĝos kiam subskribantoj estos sufiĉe multaj.

**Londono** : ➤ **PENSIO** por gesinjoroj. Hejmaj komfortaĵoj, bano (varma kaj malvarma). Moderaj prezoj. Oni parolas kaj korespondas

*Sekvo p. V.*

---

## *Societo Espero Katolika*

**CELO** Disvastigi Esperanton en la mondo katolika; produkti, traduki, dissemadi katolikajn verkojn; organizi klubojn, kunvenojn, kursojn pri Esperanto, en la katolikaro.

**KONDIĈOJ** : Esti katolika; pagi jaran kotizaĵon minimume da 1 franko. (Ĉiu donacinta 100 fr. estos « Bonfaranto »).

**SOCIETANOJ** : Aprobantoj, Adeptoj, Fervoruloj, Elektistoj.

**FAVOROJ SPECIALAJ AL ĈIUJ SOCIETANOJ** ili ĝuos rabaton da 0 fr. 50 por aboni la Revuon, rabaton da 0 fr. 20 *por cent.*, por presigi komunikojn en *Universala Informado*; rabaton da 0 fr. 50 por aboni *Oficejon de libraĵaj informoj*.

**KLUBOJ** : Kiam estas almenaŭ ses anoj de S. E. K. en ia urbo, ili povas kuniĝi, elekti komitaton kaj peti aprobon de la Direktoro de S. E. K. Kluboj tre utilos : 1<sup>o</sup> por helpi klubanojn en akirado perfekta de la lingvo Esp.; 2<sup>o</sup> por krei rilatojn inter diversnaciaj Kluboj aŭ Esperantistoj katolikaj; 3<sup>o</sup> por kunlabori internacie pri socialaj, religiaj, literaturaj, artaj, komercaj aferoj, k. c. Por faciligi tiajn rilatojn tre gravas, ke ĉiu Societano konigu sian specialaĵon aŭ profesion. Ni do proponas krei jenajn Fakojn en S. E. K. I, Religio. II, Socialaj studoj. III, Literaturo. IV, Artoj. V, Komercado kaj Industrio. Aliaj Fakoj formiĝos laŭbezono. Ni do petegas tiujn, kiuj sendos aliĝon al S. E. K., klarigi samtempe en kia Fakoj ili deziras enskribiĝi. *Ni senpage publikigos unufoje plenan adreson kaj specialaĵon de la Societanoj.*

---

**TRE GRAVAS POR NIA ENTREPreno, KE ĈIUJ KATOLIKAJ ABONANTOJ DE E. K. ENSKRIBU SIN EN S. E. K.**

---

# ESPERO KATOLIKA

REVUO MONATA EN ESPERANTO

«Unum ovile et unus pastor». -- (*Johan X. 16*).

«Unu ŝafaro kaj unu paŝtanta»

**Direktoro P-o Em. PELTIER — (PELTJE)**  
**a Sainte-Radegonde près Tours (Indre-et-Loire) France**

**Abono jara:** ) En Franclando : 2 frankoj. | **Unu numero :**  
 ) Ekster — 2 fr. 50. | 0 fr. 30, afrankite.

**Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj: oktobro, januaro aŭ marto. La Revuo ne aperas en aŭgusto nek en septembro.**

**Anoncoj.** — Tuta paĝo kostos 15 frankojn ; — duona paĝo 7 fr. 50 ; — 4<sup>na</sup> paĝo : 4 fr. ; 8<sup>na</sup> paĝo : 2 fr. 50 ; 16<sup>na</sup> paĝo : 2 fr.

Por anoncoj ripetitaj, rabatoj por tri fojoj 10 % ; — ses fojoj : 15 % ; — por 12 fojoj 20 %.

**Manuskriptoj kaj leteroj pri E. K. estu sendataj nur al la Direktoro.** — Manuskriptoj neniam estos resendataj.

ANGLOLANDO : S-o O'Connor, 17, St-Stephen's Square, Bayswater, LONDON.

BELGLANDO : S-o P. Mattelaer, 3, Place de l'Université, LOUVAIN.

ĈILILANDO S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679. SANTIAGO-CHILI.

HUNGARLANDO S-o Endre Varjufalvy Varju, IV, Kigyo, U. 6, 2. em. 14 BUDAPESTO. —

ITALLANDO : S-o J. Meazzini, presso Franco Lucani, piazza G. Monaco 18, AREZZO.

HISPANLANDO S-o Ant Guinart, Escuelas Pias. VALENCIA.

RUSLANDO Societo Espero Bol. Podjačeskaja, 24, log. 12.

MEKSIKLANDO S-o Fernando Blanco, Pastro de Santa Rosa, NECOXTLA, (Estado de Veracruz).

BRAZILLANDO S-o José Felipe d'A. Coutinho, en PATY. E. F. C. B. (Rio de Janeiro).

BULGARLANDO : S-o G. Oreškov, en PLOVDIV.

*Niaj Rajtigitoj povas varbi abonantojn kaj ricevi l'abonmonon.*

PRESEJO A. BARBOT

15, Rue Etienne-Pallu, 15

TOURS. (TUR') FRANCE

## ĜOJIGA SCIIGO !

### REVUO DA 32 PAĜOJ

Post longaj pripensoj, post multaj interparoloj kun la presisto, post precizaj kalkuloj, ankaŭ, mi decidas eldoni E. K. sur 32 paĝoj, de la proksima marto.

Inter la multaj leteroj, kiujn mi ricevis pri la egiĝo de E. K. preskaŭ ĉiuj aprobas la 32-paĝan revuon ; nur TRI legantoj estas kontraŭ la egiĝo. Sed unu el ili liveras gravajn kaj saĝajn argumentojn kontraŭ la egiĝo : « Unue, li diras, ĉu vi havos sufiĉe da *bona, korektega kaj interesa materialo* por plenigi ĉiumonate 32 paĝojn ? Preĉipe en Esperanto valoras la proverbo : « boneco pli taŭgas ol kvanto ». Alia eco estas ankaŭ necesega por la sukceso de gazeto : Apero *nepre* regula, je la difinita dato : eco malofta ĉe la esperantistaj gazetoj. Do korektega, bonstila kaj regula revuo estas preferinda ol dikaj volumoj da verkaĉaĵo. Poste, ĉu por duobla prezo vi povos liveri gazeton pli ol kvinoblan ? Mi ja ne kalkulas la tilolan kaj anocan paĝon de E. K. Mi scias ke vi respondos : Jes se nur venos abonantoj ! Jes ! Tie kuŝas la grava demando. » — Pro tiuj pripensindaj motivoj mi ŝanceliĝis. . . . Plie la voĉdonado de la legantoj ne estas plena. Estas ankoraŭ multaj kiuj ne respondis. Laŭ proverbo « kiu nenion diras, — kiam li povas libere paroli, — tre kredeble konsentas », mi do konsideras ke preskaŭ ĉiuj nunaj abonantoj konsentas pri la egiĝo de la revuo kaj de l'abonprezo.

Aliflanke, la kuraĝigaj leteroj ankaŭ enhavas bonegajn argumentojn kaj fine ili venkis miajn ŝanceliĝojn. Jen la kondiĉoj laŭ kiuj mi povas eldoni revuon 32-paĝan.

Konsiderinte, ke mi pli ol KVAROBLIGAS la enhavon kaj nur DUOBLIGAS la prezon, mi estas devigata peti de la malnovaj abonantoj, ke ili pagu 4 frankojn (5 frankojn ekster Francujo) POR LA TRIA JARO, tio estas de oktobro 1905 ĝis oktobro 1906, (aŭ de la komenca dato de ilia abono inter oktobro kaj marto). La novaj abonoj kompreneble komencos de Marto.

Pro la plielspezoj de sendado en eksterfrancaj landoj, la abonprezo eksterfrance estas ankaŭ duobligita, tio estas 5 frankojn.

De nun, oni presigos en E. K. la nomaron de tiuj, kiuj pagis sian abonon : tiu ĉi enskribo valoros kiel kvitanco kaj evitos al ni senutilan laboron. *Mi insiste petegas, ke oni ne prokrastu la sendon de l'abonmono.*

Se kelkaj ne volas aŭ ne povas akcepti la novajn kondiĉojn ili pagos nur 2 frankojn (aŭ 2 fr. 50 ekster Francujo) kaj ricevos la numerojn de Marto kaj Aprilo, per kiuj ili ricevos *pli ol la antaŭa* enhavo de E. K.

Oni komprenas, ke mi ne povas verki mem la materialon necesan por la 32 paĝoj de la revuo. Mi do sendas alvokon al ĉiuj legantoj por

ke ili sendu al mi interesajn artikolojn, laŭ la programo definita en la oktobra numero de E. K. — Estas dezirinde ke E. K. havu *almenaŭ unu regulan kaj fervoran kunlaboranton* en ĉiu nacio, por liveri informojn pri la movado de l'ideoj en ĉi tiu lando.

Ĉiu diskutado estas libereme akceptata (krom pri politikaj naciaj demandoj) kondiĉe, ke la verko estos bonstila, ĝentila, pacema.

La esperantistaj aferoj aperos sub speciala rubriko : *En Esperantujo*.

Mi plene esperas, ke la granda paŝo antaŭen, kiun mi hodiaŭ faras, — ne sen kelkaj timoj, — estos fruktodona. Mi esperas, ke la legantoj de E. K. varmege klopodos por varbi novajn abonantojn. Ili nun ne timos ke oni moku ilin pro la mizera eteco de la revuo !

Kuraĝe antaŭen, karaj legantoj !

« LA NEPOJ VIN BENOS ! »

LA DIREKTORO DE E. K.

## ĈU LA PREĜARO PRESIĜOS ?

La manuskripto de la unua parto estas preta. La presisto atendas nur ordonon ! Kaj mi atendas nur iom pli da subskribantoj ! Se la librovendistoj Esperantistaj subskribus po 10 ekzempleroj (ili certe vendos pli ol 10 Preĝaroj), la necesa nombro da ekzempleroj subskribotaj estos rapide atingita. Karaj legantoj, se vi ne volas skribi al mi, iru ĉe via libristo, kaj tuj mendu ĉe li la Preĝaron.

La kosto por la tri kajeroj estos 3 frankoj *afrankite*. La tri kajeroj formos volumon da 390 paĝoj ĉirkaŭe ; tre plena Preĝaro (1). Ni bezonas pliajn subskribojn nur por 80 ekzempleroj. Tuj kiam tiu ĉi nombro estos atingita, ni donos la manuskripton al la presisto, kaj ni petos la 3 fr. de ĉiu subskribinto. Tiu sumo donos rajton ricevi la tri kajerojn *afrankite*.

## LETERO EL ITALUJO

« Pastro Meazzini skribis al mi ke vi, en pasintaj jaroj, havis ideon tradukadi Esperanten la Sanktan Skribon. Tre bone. Multaj jam aŭtoroj estas esperanten tradukitaj, kiel Homero, Virgilio, ktp. Sed kial ne la libroj donitaj al ni de la Spirito Sankta por nia ĝojo kaj instruo ? Vian ideon mi tre aprobas.

« Sed tial ke tiu laborado estas longega kaj malfacila, mi proponus, ke grupo da pastroj faru bonegan tradukon laŭ tekstoj latina, greka, hebrea, k. c.. kaj ĉiuj pastroj katolikaj kunlaboradu por la notetoj.

« Ĉiu pastro povis tutforte lerni la verkojn plej bonajn pri la S. Skribo, kaj la frukton de legado sendi, en mallongaj raportoj, ordigitaj laŭ

(1) Vidu la enhavon de la 1-a kajero en la No. 22 de E. K.

ĉapitroj, al la tradukantoj, kiuj laŭmerite, kaj laŭbezzone elektus el ĉiuj raportoj notetojn por la Sanktegaj Libroj.

« Tiel ni facile povos eldoni unu libron de la Santka Skribo ĉiujare.

« Tiel ni vastigus la Diverojn kune kun Esperanto inter la Katolikaro ; ĉar multaj katolikoj, precipe pastroj, aliĝus al ni kaj eklernus Esperanton por ĝui la frukton de lernado de pastroj ĉiulandaj.

« Tial ni estus vere familio katolika kunlaboranta por la savo de l'animoj per la veroj al ni de Dio malkovritaj, kaj per unuigo de ĉiuj gentoj per Esperanto.

« Kuraĝiĝu, Karega kunfrato ; ni konigu tiun entreprenon ; ni laboradu tutforte de nun por havi en venontajaro la eldonon de l'unua libro : Geneso.

Kun tre kora saluto mi restas via Sindenaoma Kunbatalanto.

Pastro Jakobo Bianchini.

la 10-an de januaro 1906.

Noto. — La Direktoro de E. K. tre aprobas la iniciativon de P-o Bianchini kaj plezure ricevos la nomojn de l'Pastroj, kiuj deziras partopreni tiun laboradon. La plej praktika rimedo ĝin realigi estas, kredeble, la kreo de *Rondiranto manuskripto* inter la verkantaj Pastroj. Ni same tre konsilas, ke la Pastroj eklernantaj Esperanton aliĝu al la *Rondiranto* kreota de P-o Servais. (Vidu anoncon).

## LETERO EL KANADO

### PRI SANKTA ANNO

Estas tre malmulte da Sanktuloj kiuj ĝuadas tiel grandan amon kaj konfidon inter la Francaj Kadanoj. Kaj sendube ne estas en la tuta Kanado pilgrima loko pli bone konata kaj tiel vizitata ol la preĝejo de « Sainte Anne de Beaupré. »

Oni kalkulas pli ol 200.000 da pilgrimuloj, kiuj ĉiujare aliras la Grandan Sanktulon, ĉu por petegi novajn favorojn, ĉu por dankegi sin pro favoroj ĉiuspecaj ricevitaj pro la propetado al « La Bona Sankta Anno », kiel nomas sin la Kanadanoj.

Ŝi estas la Mirakla Sanktulino de tiu piema popolo.

La pieco de la Kanadanoj al la patrino de la Dipatrino estas tiel malnova, kiel ilia Historio.

La historiistoj rakontas ke kelkaj Britan'aj (1) maristoj surprizitaj de la ventego, suprenirante la riveregon « St. Laurent » promesis al Sankta Anno, ke ili konstruos kapelon al ŝi, se ŝi salvos ilin de la pereco. Tuj la blovadego de l'vento ĉesis kaj post kelkaj tagoj da marirado ili trafis teron, precize en la loko kie ili, dankemaj maristoj, konstruis Kapelon,

(1) El franca Britujo.

Bedaŭrinde tiun ĉi kapelon konstruinte tro proksime al la riverego, la superakvo ĝin forportis kaj oni devis konstrui alian kapelon (1657-60).

Malmulte da tempo post la konstruado de la dua kapelo, loĝanto de Beaupré, nomata Louis Guimont, kiu multe suferis pro lumbo-mal-sano, helpis pro pieco loki tri ŝtonojn en la fundajo de la kapelo kaj tuj resaniĝis.

Tiu ĉi miraklo estis nur la unua, kiu baldaŭ estis sekvata de miloj da aliaj en tiu ĉi kapelo mirakla.

J. ALF. OUELLET.

## ANKORAU PRI « ALIUJ », « MULTUJ », ktp. KUN OPINIO DE D-RO ZAMENHOF.

Ankoraŭ kelkafoje oni legas en iuj aŭtoroj la vortojn: *aliuj, multuj, aliel, mies, k. t. p.* Ili tamen estas tute malregulaj.

La silaboj *u, el, es* k. c. ne estas vere sufiksoj memstaraj, ĉar ili ne troviĝas en *Univers. Vortaro*; oni ne povas do ilin uzi laŭvole por vortfarado.

Ili estas simplaj finiĝoj ekzistantaj nur en specialaj serioj klare difinitaj kaj limigitaj en *Ekzerkaro*; tiuj ĉi solaj estas akceptindaj, kaj neniu havas rajton aldoni aliajn.

Nenion signifas se eble iam-okaze en la malnova *Esperantisto* presiĝis tiaj esceptaj formoj; ili estis nur provoj kiuj tute malaperis en *Ekzerkaro* kaj *Fundamento*.

Fine, se oni volas aŭtoritaton, mi citas *la personan opinion de D-ro. Zamenhof* mem, kiu per privata poŝkarto de la 25-a de oktobro 1905 skribis al mi la jenon laŭtekste; « *La vortoj aliuj, multuj, kelkuj, aliel, mies, k. t. p. estas tute malbonaj.* »

Tio estas sufiĉe klara, mi pensas.

A. E. Sekretario de la grupo en Bourges.

## PREĜO (el Lamennais)

« Sinjoro, ni al vi ekkrias, el la fundo de nia mizero...

Kiel bestoj, al kiuj mankas nutraĵoj por doni al sia idaro, ni al vi ekkrias, Sinjoro.

Kiel ŝafo de kiu oni forprenas ŝafidon, ni al vi ekkrias, Sinjoro.

Kiel kolombo, kiun ekkaptas vulturo, ni al vi ekkrias, Sinjoro

Kiel gazelo, sub la ungego de tigro, ni al vi ekkrias, Sinjoro.

Kiel vir-bovo senfortigita pro laceco kaj sangokovrita per pikilo, ni al vi ekkrias, Sinjoro.

Kiel birdo vundita, kiun persekutas hundo, ni al vi ekkrias, Sinjoro.

Kiel hirundo elfalinta pro laciĝo, kiam ĝi transiris marojn, kaj baktanta sur l'ondoj, ni al vi ekkrias, Sinjoro.

Kiel vojaĝantoj erarantaj en varmega kaj senakva dezerto, ni al vi ekkrias Sinjoro.

Kiel ŝippereitoj sur lando senfrukta, ni al vi ekkrias, Sinjoro.

Kiel tiu, kiu, je l'horu de noktiĝo, renkontas apud tombejo malbel-egan fantomon, ni al vi ekkrias Sinjoro.

Kiel patro, de kiu oni forŝtelas la paneron, kiun li portas al siaj malsataj infanoj, ni al vi ekkrias, Sinjoro...

Tradukis: L. MILHO.

## KRISTANA VENGO (sekvo<sup>1</sup>)

Kvara horo batas.

Radoj grincigas sablon. Oni fermas subite la pordon... kelkaj paŝoj tra la malhela koridoro, kaj la Grafo de Fierly eniras la ĉambron kie kuŝas lia filo.

— Ĉu la kuracisto ne estas tie? Ĉu oni lin avertis, diris li mirigita.

— Jes. Mi ne povas klarigi kial.

— Ke vi senkulpigu min se mi iomete malfruas, aldonis post ili tre konata voĉo, sed oni ĵus venigis min por afero, kiu similas al tiu-ĉi. Estas certe epidimio kiu komenciĝas.

— Ĉielo! diris la Grafino, kaj ĉe kiun vi ĵus iris?

Ĉe la gesinjoroj Rougeard... kies la malfeliĉa knabeto estas tre malsana!... Mi ĵus operaciis lin pri la traĥeo. Sed, ni vidu tiun-ĉi tubeton.

Dum la kuracisto meditanta preparis l'ilon por inokuli, la rigardoj de gepatroj de la malsanuleto ekrenkontiĝis. Ŝajnis kvazaŭ la Grafo dirus « Kion vi pensas pri tio »? Kaj en la malsekaj kaj petegantaj okuloj de la juna edzino, li bone legis ĉi-tiun respondon: « Ho! mia amiko, ni devas nun pardoni... ni estas gekristanoj...Kaj plie, ĉu tio ne estas garantiaĵo ke Dio benos nian filon »?

En la tuta estaĵo de Grafo sin montris io decida; kaj li alproksimiĝanta al operacisto, diris al li kun iom da tremado en la gorĝo:

— Doktoro, se vi opinias ke la stato de nia filo ne absolute postulas la tutan enhavon de tiu ĉi tubeto, la Grafino kaj mi estus tre feliĉaj se vi volonte konsentus rezervi la restaĵon por via malsanuleto de malsupre.

— Unu kondiĉo, aldonis la kuracisto kiu, ne miranta plue, ekpenis por viŝi la neoportunajn larmojn kiuj gutadas sur liajn maljunajn vangojn sulkigitajn.

— Kia?

— Estas ke ni kune kuniros por ĝin porti.

1. vidu la komencon en n-o 19-a de E. K. — Rougeard, socialisto, venkis je la elektoj Grafon de Fierly. Ili estas malamikoj. — La filo de l'grafo malsaniĝas. Nur seromterapio povas lin resanigi. La grafo devis iri Parizon por havi tubeton da kostega kuracilo. Li ĵus revenas.



— Tre volonte.

Kvin minutoj pasis, kaj sinjoro de Fierly, kiun akompanas la kuracisto viŝanta de siaj okuloj la larmojn, rapidege malsupreniĝis sur la deklivo de la monteto per helpo de liaj ĉevaloj, kiam subite la kaleŝo haltis.

La kapo malkovrita, tie staras viro kiu, aŭdinta la ĉevalfrapadojn de la jungitaj ĉevaloj al la kaleŝo de la kastelo, estis ĝin haltiginta per signo de la mano, kaj nun, ĉe la pordeto, parolas per voĉo peteganta kaj iom rompata de ploregoj :

— Via grafa Moŝto, mia infano tuj eljetos la lastan spiron. oni diras ke vi havas kuracilon... se kelkaj gutoj restus.

— Amiko mia, respondis la Grafo de Fierly, mi rapidas por alporti la duŝnon al vi., jen estas ĝi!

JEAN DES TOURELLES (El france tradukis A. Denoncin).

## AVIZO

Jenaj artikoloj estas prokrastitaj ĝis nia proksima numero *Religia Movado* ; *Revuo de la Revuoj Esperantistaj* ; *Bibliografio* de novaj libroj ; *Monoferoj* por E. K. ; *Respondoj* al nia *Letero al ĉiuj Pastroj Kristanaj* ; k. c.


## PENSOJ

➤ La tuta sekreto de l'arto plilongigi la vivon estas ĝin ne mallongigi.

➤ Por ke l'aktiveco estu vere efika, tri kondiĉoj estas necesaj : 1-e ĝi devas esti saĝe modera, kaj eviti ĉiujn troaĵojn ; 2-e ame penadi en la ĝusta momento, pri objekto, por kiu ĝi taŭgas ; 3-e intertempe ripozi, kaj diversigi ĝiajn okupojn. La naturo de nia spirito estas tia, ke ripozo ĝin senlacigas malpli ol diverseco.

## ŜAKOJ

NIGRO 8 pecoj.



BLANKO 7 PECOJ

PROBLEMO 4-a

de STELETO

(Speciale verkita par E. K.)

Blanko komencas, kaj mortigas per la 3-a iro.

Sendu solvojn al la Direktoro de E. K.

—:—

La solvon de Problemo 3-a ni donos en la marta numero, kun la nomoj de la solvintoj.

## KUN SES BELAJ ILUSTRAJOJ, KATO KUN BOTOJ.

Kosto 0 fr. 50, afrankite. Aĉetebla ĉe la Direktoro de E. K.

Specialaj kondiĉoj por almenaŭ dek ekzempleroj kune mendataj.

**Baldaŭ aperos n-o 2-a : Cindrulino, kun 6 ilustraĵoj; sama prezo.**

## LINGVO INTERNACIA

### ESTAS NUN DUONMONATA

Enhavas 24 paĝojn. Sen literatura aldono 5 fr. — kun literatura aldono : 7 fr. 50. Adreso nova : Presejo Esperantista, 33, rue Lacépède. Paris, 5<sup>e</sup>.

➤ LE SOUVENIR, Monato Ĵurnalo literatura. — BELGUJO 1 frank. — Unuiĝo poŝta 1 fr. 50 — Direktoro-Fondatoro XAVIER CASIER, Premiita de Akademio Reĝa de Bel-Artoj, membro de komitato de « Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

KOLEKTISTOJ S-o, VARJU Endre, Budapest, IV, kygio U- E. 62. em, 14, kolektas k. interŝang. uzitajn poŝtm.

RONDIRANTA MANUSKRIPTO, ĉiumonata, nur inter pastroj katolikaj el ĉiuj landoj Eŭropaj. Partopreno senpaga. Oni povas skribi pri ĉiaj aferoj, precipe religiaj, kaj korektas reciproke la tekstojn. Tio tre utilas por plibonigi stilon esp., ellabori terminaron teologian, kc. ; estas tre agrabla ; 2-an folion oni povas uzi por korespondi kun iu el la R-anoj pri malb. korektaĵoj au eĉ aliaj aferoj tiel : “ al R-ano No. . . » sin, turni al SERVAIS Pro. Kat. ĉe Basilides, pl. Leopold, 7, NAMUR Belgujo.

HO, MIA KOR Kanto Esperantista. Poezio de D-ro Zamenhof Muziko de S-ino Josée GUIVY. — Plej ŝatinda muzikaĵo, kantita en Boulogne, dum la Kongreso. Aĉetebla ĉe la Presa Esperantista Societo, kaj ĉe la Direktoro de E. K. — Prezo 1 fr.

ESPERO PACIFISTA, MONATA ORGANO DE LA SOCIETO POR LA PACO, abono 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj.

S-ro Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

ANNALES DE PHILOSOPHIE CHRÉTIENNE (*Analoj de Filozofio Kristana*). — Direktoro : Pastro Laberthonnières. Administracio : Librejo Bloud, 4, rue Madame, Paris ; abono jara : 20 fr. — 100-paĝoj monate. — La plej internacia, plej serioza, plej progresema revuo filozofia !

Esperante, Angle kaj France. Sinjorino O'CONNOR. Esperanto House. St. Stephen's Sq<sup>r</sup>, Bayswater, 17.

➤ **ESPERANTA LIGILO**, revuo por Blind., eliros en 1905 ĉiudumonate (6 numer jare). Abono : 3 fr. Oficejo : 12, rue Soufflot, Paris. Direktoro : S-o Th. Cart. Oni abonas ankaŭ ĉe nia « Oficejo de Libraj Informoj », — La 4 n-oj de jaro 1904 estas nune aĉeteblaj.

**Vojaĝoj** : ➤ S-o CASIER, 83, boulevard Anspach 83, Bruxelles (Bourse). — Téléphone 45-50. — Biletoj rektaj aŭ rondiraj kun rabato. — Ekskursoj sen aŭ kun kondukto kosto laŭ reciproka konsento. — Speciala kaj agrabla sistemo por edziĝaj aŭ familiaj vojaĝoj.

## LIBROJ KAJ GAZETOJ RICEVITAJ

**INTERNACIA SCIENCA REVUO** : Decembro 1904. — Enhavas tabelon da teknikaj vortoj ĝisnun uzitaj en I. S. R. Tiu n-o estas aĉetebla aparte : 60 centim.

Januaro : Unu Jaro (P. Fruictier); interesa antaŭparolo de la Direktoro. — Nova elementa geometrio de Ch. Méray (P-ro Bourlet). — La maljuneco (P-ro Meĉnihov). — La kemiaj industrioj en Germanujo (P. Lemoult). — La granda Pingveno (P-ro Duchaussoy). — Kara-Kurt (Iĉet-Verikov). — Gazetaj analizoj kaj enhavoj:

Februaro La timo al la morto, originala artikolo (D-ro Vallienne). — La maljuneco (daŭrigo). — La kemiaj industrioj en Germanl. (fino — La granda Pingveno (daŭr.). — La praktika kuracado en Okcidenta Ameriko (L. E. Meier). — Spiritismo antaŭ scienco (P-ro J. Grasset, trad. de D-ro Moulis); historia kaj kritika studado de faktoj pli malpli mirigaj. Tre interesa.

**LINGVO INTERNACIA** (15 an de majo). Nia ĉefa revuo internacia apeŝas nun regule ĉiudekkvintage. — La Hina manĝo (J. Napot). — Pli alta per unu ŝtupo, (de Elihu Burrit, trad. Buffalo Bill). — La morto de la reĝido (de A. Daudet, trad. L. Rigoir). — Tra la mondo Esperantista. — Movado Esp.

**L'ESPERANTISTE** (Aprilo). Historio de l'Esperanto (L. de Beaufront). — Kroniko (S. Meyer). — La neĝo (de J. Claretie, trad. J. Flourens). — Gramatikajo : korseto, korsajo.

**SUNO HISPANA** (majo). Tute dediĉita al tradukoj de « La sprita junkro ?) Don Kihoto de Manĉujo », de Cervantes. Aparte aĉetebla.

**THE ESPERANTIST** (majo). Voĉo el la Himalajo. — Sanskrita legendo. — La konscienco (de V. Hugo, trad. C. Guersent, el Rouen). — La sonĝo de Klarencio (Shakespeare, trad. C. Bicknell). — La urbo de la demonoj (Elise Bauer). — Sur la glacio, el « La dokumentoj pri Pickwick » (de Dickens, trad. A. Cowan); kaj aliaj bonegaj artikoloj.

**SVISA ESPERO** (Marto). Sciigoj pri la Kongreso. — Kroniko svisa kaj fremda. — Atentiĝa ideo, de S-no H. Stroele. Proponas, ke Esperantistoj interkonsentu pri elekto de urbo en centra Alpo, por tie paŝigi la libertempon.

**THE BRITISH ESPERANTIST** (majo). Kroniko pri Anglaj grupoj. — Facila maniero propagandi (P. D. Hugon). Grava letero de S-o L. de Beaufront. — Roosevelt kaj la « Ruĝakruco » (H. K. Gordon). — Iom pri la infanoj (Adela Schafer). — Interparolado (J. A. Thill); kaj t. p.

**GERMANA ESPERANTISTO** (majo). — Por la propagando. — Diversaj avizoj. — El germanlingvaj landoj. — Kion ne komprenas la birundoj

kaj papilioj. — Esperanto kaj negoco. — La letero al la rekruto (H. Conscience, trad. D-ro Van Melckebeke).

ANTAŬEN ESPERANTISTOJ! (marto). Pri novaj radikvortoj. — Senfadena telefonio per Hertz'ondoj. — Kroniko. — Aritmetiko (P-ro H. Boucon).

JUNA ESPERANTISTO (marto). Monata kaj universala, por junuloj. — Al Esperantista junularo. — Movado Esperantista. — La Gers'a lago (de Topffer, trad. E. P.).

MEKSIKA LUMTURO (februaro); ĉiudumonata. — La afero de la strato Lursino, komedio de Labiche, Monnier kaj Martin. — Subskribado por la Kongreso, jam 175 dolaroj. — Soneto. — Telefona interparolado (Marcel Finot). — Kroniko. — Gazetaro (en kiu ne troviĝas la enhavo de *Espero Katolika*, Kial?).

ALGERIA STELO (5-an de majo). Esperanta ekspozicio en Alĝero. — Kelkaj impresoj pri mia vojaĝo en Alĝero (Grafo A. Gallois). *Ni tre desiras koni la nunan adreson de S-o Gallois, eks-raĵtigito de E. K. en Itallando.* — Timgad. La Constantin'a Valo.

ESPERANTO (majo). Scienca kaj literatura monata gazeto. Redaktoro: Marich Agoston. Budapesto, IV, Papnovelde-u. 6. -- Nova gazeto esp. ok-paĝa. Bonvenon al ĝi!

ESPERO DE KATALUNJO (N<sup>o</sup> 3-a, monata). Nova bolteno en Esperanto kaj en Katalunja lingvaĵo, eldona de firmo L. Lamiot, Ceret, Pyr.-Orient.-Francl.

LA TEKNIKO DE LA TERMALA KURACADO ĉe AIX-LES-BAINS. (D-ro Jean Dardel), Unua libro de « Esperanta medicina Biblioteko », eldonita de firmo A. Maloine, 25, rue de l'École-de-Médecine, Paris. Detala kaj ilustrita informado pri la kuracado en Aix-les-Bains.

L'EST SPORTIF (5 an kaj 20-an de majo). Enhavas kronikon Esp. de Inĝeniero Pourcines.

WOMANHOOD (majo). Protesto kontraŭ la eraron de l'broŝureto « Esperanto Key », pri la elparolado de eŭ.

LA METROPOLE, el ANVERS (14-an de aprilo) anoncas nian projektitan eldonon de *Preĝaro kaj Imitado*.

REVUO DE FRANCA PASTRARO (15-an de majo). La rolo de Papo, laŭ Napoleono I-a (H. Lesêtre). — La Sankta Virgulino en la poezio franca mezaĝa (Rousselot). — Edukado je l'vidpunkto de la socialaj devoj (J. Vaudon). — Kroniko teologia (Ermoni). -- Lingvo Internacia: Latino kaj Esperanto. (R. de la Guéronnière).

ANALOJ DE FILOZOFIO KRISTANA (majo). Precipaj datoj de la vivo de S-a Ireneo: lia Mari'a teologio (A. Riguet). — Katolika mistikeco kaj l'animo de Dante (A. Leclère, daŭrigo). — Filozofio de l'rolo de la Presaro (G. Prévost). — Pri la malvera pieco al la Virgulino J. Simiński kaj Ch. Denis). Historio de la religioj, okaze de ĵuseldonita libro (Ermoni).

TERPECO KAJ HEJMO (aprilo). Kiel favori la malgrandajn proprajojn. — Diversaj sciigoj pri la ĝardenoj por laboristoj. — Kongreso de Blois, la 28-an de majo.

LA VOIX DE SAINT-NICOLAS (La voĉo de S-a Nikolao, -majo) Monata bolteno paroĥa de Boulogne-s-mer. — Kroniko paroĥa. — La Protestantismo en Boulogne de la Granda Revolucio ĝis niaj tagoj. — Religia febro en Wales (Anglollando). Tre interesa raporto pri la nuna movado religia en tiu provinco. — Robespierre kaj Mazini.

PROTECTION DE LA JEUNE FILLE (Protektado de la junulinoj). Marto kaj aprilo. — Raporto financa por j. 1904. — Cirkulero de l'Internacia Komitato. — Kiel formadi la junulinojn por sociala la borada. — Kroniko.